



bazitan ĉefe sur edukado, ricevita de siaj gepatroj aŭ de socio, kiu spegulas la scion de la prauloj. Do estas tute normala ke en vodua kulturo, personoj havas malsamajn metodojn adori, kaj tial ekzistas malsamaj perantaj reprezentaĵoj de „Gbedoto” (kreinto de la universo). „Gbedoto” estas tiu, kiun nomas aliaj kulturoj Dio, Alaho, Mawu, Nyankupon, ktp. Iuj vidas Voduo kiel multdian religion, sed ĉi tio eble ankaŭ donas al Voduo ĝian tolereman kaj flekseblan karakteron. Povas okazi sanga batalo inter du anglaj komunumoj kiuj estas membroj de malsamaj kristanaj eklezioj, sed tia batalo por similaj kialoj neniam okazus inter „Sapkataŝi” (ano de Sapkata) kaj „Heviosoŝi” (ano de Hevioso), du el la multaj diaĵoj reprezentitaj en Voduo.

Tiuj, kiuj ankoraŭ timas sorĉkantojn metitajn sur pupo aŭ amuleto pendants de la kolo, devus atenti al alia afero nomita de Fon-parolantoj „Boo”. Tio similas al iu, kiu recitas la Psalmojn klinante al statuo de Jesuo sur unu el la montoj en Rio-de-Ĵanejro por venki en milito aŭ sukcesi la ekzamenon. Ĉu tia recitado venkigas? Hmmm... eble jen la punkto.

— Jean CODJO

Trovita en *Tamtamo* (numero 12). Uzata kun permeso de la aŭtoro. Verkita por Argosy.ca, sendependa studanta ret-ĵurnalo ĉe la Universitato de Mount Allison, Sackville, Nov-Brunsviko, Kanado.

## NOVAĴOJ EL ALBANUJO

Anisa estas 14-jara lernantino en la instituto por nevidkapablaj lernantoj en Tirana. Ŝi partoprenas la Esperanto-kurson en sia lernejo ekde kelkaj monatoj. Lastan merkredon, dum la libera konversacio en la lecionhoro, ŝi rakontis la jenan okazintaĵon:

Monaton antaŭe, grupo de privata televid-stacio „Shijak” vizitis kaj filmis ilian lernejon. Ili petis de la lernejestrino permeson ekvidi la lernolibrojn en Brajlo kiujn oni presis por la lernantoj. Sur la bretoj ili rimarkis hazarde dikajn lernolibrojn. „Jen kelkaj el la lernolibroj en la Brajla,” klarigis al ili la lernejestrino. „Estas metodo de la Esperanto lingvo, kiun oni instruas en nia lernejo dum la pasinta jaro.” Tiumomente, unu el la ĵurnalistoj diris: „Oni revivigas mortintan lingvon.”

Anisa, aŭdinte tian nepravon opinion, respondis al ĵurnalistoj kuraĝe kaj firme, „Ne, sinjoro ĵurnalista, Esperanto ne estas mortinta lingvo, ĝi estas bela kaj parolebla lingvo.”

Tion rakontante, Anisa timis ke la instruisto malĝojiĝas pro malbona opinio de ĵurnalista pri la lingvo kiun li tiel volonte kaj entuziasme instruas al la lernantoj. Sed ne, mi kore dankis al Anisa kaj kaptis la okazon por ekspliki al junaj lernantoj kial Esperanto ne progresas tiom rapide kaj grandskale en la mondo nuntempa. Mi menciis multajn aliajn ekzemplojn similajn, kiel la „araban”

sistemon de nombroj kiun la homaro akceptis definitive nur post kvin jarcentoj, kaj la metrikan sistemon de mezuroj kiu ankoraŭ ne estas akceptita en la tuta mondo moderna, ktp.

— Bardhyl Selimi  
<selimib@albmail.com>  
Trovia en **Landa-Agado**, 25an de majo 2002

## ESPERANTO-LIBRARO DE FAJSZI MALFERMIĜAS AL LA PUBLIKO

Budapeŝto, Hungario: Esperanto, lingvo kreita cele al venko kontraŭ barieroj al internacia komunikado, montriĝas ankoraŭ vivanta en Hungario.

Kolektaĵo el pli ol 40 000 dokumentoj en Esperanto malfermiĝis al la publiko ĉe Budapeŝta Biblioteko je ĵaŭdo, la 11a de aprilo.

Sed Esperanto, kvankam graviĝinta en multaj landoj, neniam fariĝis universala lingvo kiel celis D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof je la aperado en la jaro 1887. Tiutempe la franca estis la plej grava lingvo en Eŭropo inter artistoj, sciencistoj kaj diplomatoj.

„Tiu ĉi estas la kvara plej granda kolektaĵo de Esperantaj verkoj en la mondo, kaj ni fieras doni al ĝi hejmlokon”, diris Jenő Juhasz, Direktoro de la Nacia Biblioteko de Fremda Literaturo.

„Ni esperas havebligi ĝin al la tutmondaj parolantoj de Esperanto pere de interreto ekde la ĵarfino,” li diris.

La libron kolektis Károly Fajsz, 91-jara, kiu atenteme bindis kaj enkatalogigis ĉiun volumon. La Ministrejo de Kulturaj Heredaĵoj aĉetis la vivlaboron de Fajsz kontraŭ kaŝita sumo post kiam la hungara registraro malpermesis vendon al fremdlandaj aĉetuntoj.

Zamenhof esperis, ke la konsekvenca strukturo de Esperanto popularigus ĝin kiel mondkomunikilon. La lingvo rapide akceptiĝis en Hungario kie la unua libro en Esperanto, trezoro de la kolektaĵo, estis eldonita en la jaro 1895.

„Unu el la gravaj pioniroj de la Esperanto-movado estas Theodor Schwarz<sup>1</sup>, la patro de la usona miliardulo kaj komercisto, George Soros,” diris György Sebehazy, la bibliotekisto kiu prizorgas la kolektaĵon. „Li Esperantistiĝis dum li estis milit-kaptito en Rusio dum la unua Mond-Milito. Kiam li revenis al Hungario, li komencis eldoni librojn en la nova lingvo,” li diris.

Malgraŭ la pligraviĝo de la angla kiel mondlingvo, Sebehazy asertas, ke 4000 hungaroj parolas Esperante.

— fare de Karl Peter Kirk, Raportisto de Associated Press, je ĵaŭdo, la 11a de aprilo, 2002. Gene Keyes trovis en la interreto kaj Steĉjo tradukis el la angla.

<sup>1</sup> Legu Inter Ni (marto 2002) por pli da informo pri la hungaro Tivadar Soros.

Rimarko de la Redaktoro: Binditaj volumoj de Inter Ni estas inter la dokumentoj sur la bretoj de la budapeŝta libraro.